# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

***Volumo 49, Numero 2, Aŭgusto 2016***

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Lushnikov, Provleganto: Nicole Else**


## EFNSK Jarkunveno



Karaj membroj,

Baldaŭ okazos la jarkunveno kaj voĉdonado por renovigi la estraron de la federacio. Mi esperas, ke vi ĉiuj partoprenos en tiu voĉdonado. Donu mandatojn, se vi ne povas persone ĉeesti.

Antaŭ iom da tempo mi havis la impreson ke la federacio transformiĝis al klubo por emeritaj viroj. Tamen feliĉe lastatempe venis pluraj pli junaj personoj. Mi pensas, ke gravas havi diversecon de aĝoj. Mi ne volas diri, ke emeritaj viroj ne venu, sed se ili estas la granda plejmulto, tio povas esti problemo, ĉar novuloj junaj ne sentos sin komfortaj.

Mi tre kontentas, ke Jonathan Cooper kandidatiĝis kiel prezidanto. Mi dankas al Roger ke li pretis esti prezidanto dum pluraj jaroj kaj multon faris por la federacio, sed nun kiam li estas pli ol 85 jara, ĉu ne estas tempo ke li transdonu la postenon al pli juna persono? Ni havas la bonŝancon ke ja estas tre kompetenta pli juna persono kiu kandidatiĝis. Mi esperas, ke vi ĉiuj subtenos Jonathan kaj la federacio povos eniri pli modernan tempon kun iu kiu tre spertas pri sociaj retejoj kaj aliaj surretaj programoj. Junuloj nun komunikas ege multe per Facebook ekzemple, do gravas havi prezidanton kiu bone regas tiujn novajn metodojn komuniki.

La fakto ke mi subtenas Jonathan kompreneble ne signifas, ke mi volas ke Roger foriru. Mi nomumis lin kiel vicprezidanton de la federacio. Bedaŭrinde Roger malakceptis tiun nomumon. Li volas esti prezidanto aŭ nenio. Nu mi malŝatas tian sintenon. Se li vere deziras helpi al la Esperanto-movado ne vere devus gravi ĉu li estas prezidanto aŭ vicprezidanto, ĉiukaze la prezidanto havas unu voĉon same kiel ĉiuj aliaj estraranoj. Krome la prezidanto ne regas la aliajn estrararojn, li nur prezidas dum la kunvenoj. Nu bedaŭrinde Roger montris al ni foje kaj refoje, ke li ne kompetentas pri tiu tasko. Liaj personaj emocioj malhelpas lin plenumi tiun rolon. Li daŭre provas trudi al ni siajn personajn opiniojn kaj volas regi nin, dirante je kiu horo ni DEVAS alveni, ke ni ne sufiĉe laboras, ktp. Roger jam verkas la novaĵleteron ĉiun semajnon, do ĉu li vere bezonas aldone esti prezidanto? Tamen se li ja ankoraŭ havas sufiĉe da fortoj por fari pli li estas tre bonvena helpi nin kiel vicprezidanto aŭ simpla estrarano, sed mi ne povas subteni lian kandidatiĝon kiel prezidanton. Kaj mi ege malŝatas lian minacon: Elektu min kiel prezidanton aŭ mi forlasos la estraron. Li kompreneble rajtas tion diri, sed mi esperas, ke vi ĉiuj komprenos ke ni ne bezonas tian prezidanton en demokrata organizo. Se li volas helpi li estas bonvena, se li faras kondiĉojn kiel mi helpos nur se vi elektas min kiel prezidanton, tiam mi pensas ke ni prefere rezignu pri lia helpo.

Mi esperas, ke vi bone pripensos antaŭ ol voĉdoni. Ĉu voĉdoni por Roger, simple por danki lin ke li jam dediĉis multajn horojn al Esperanto aŭ ĉu subteni iom pli junan personon kiu pli bone kapablas uzi la modernajn komunikrimedojn, kiu pli bone kapablas prezidi kunvenojn kaj donas pli junan bildon al la organizo?

Amike, Nicole

Kandidatoj por prezidanto de EFNSK



## Roger Springer

Mi estis la prezidanto de la NSK Federacio dum la pasintaj 6 jaroj. Dum tiu periodo, Esperanto kaj la Federacio estis la centro de mia vivo.

En 2014 AEA rekonis mian kontribuon, precipe mian kreaĵon de la enreta revuo, 'La Aŭstraliaj Esperantistoj', kiun mi publikigis regule, almenaŭ ĉiusemajne, ekde Septembro 2011 kaj sen interrompo, ili nomis min la Esperantisto de la Jaro 2014.

Kompreneble, la sukceso de tiu gazeto dependis de mia ricevo de kontribuoj de aliaj esperantistoj, pri eventoj kaj agadoj kiuj estus interesaj al aliaj en la Esperanta komunumo ktp.

Nun tiuj kontribuoj estis, neklarigeble, multe malpli oftaj. Mia provo havi mallongajn prelegojn en niaj monataj kunvenoj havis utilan efikon evoluigi la parolkapablon de niaj membroj kaj igi niajn kunvenojn pli allogaj.

Se reelektita kiel prezidanto, mi daŭre klopodos plibonigi la funkciadon de la posteno kaj la disvastigadon de Esperanto.

## Jonathan Cooper



Eble vi scivolas, kial mi kandidatas por prezidanto? La simpla respondo estas, ke du homoj petis kaj nomumis min! Sed, kio estas la malpli simpla respondo? Nu, mi neniel deziras potencon. (Fakte, oni petis min, antaŭ la elektoj de 2014 kaj 2015, kandidati por prezidanto, sed mi tiam respondis nee.)

Se vi elektos min, mi certe penos esti bona prezidanto, sed mi ne estus la fonto de ĉiuj novaj ideoj por la Federacio: mi dependus de vi.

Mia ĉefa celo estus, ke vi, membroj, sentu ke la Federacio aŭskultas kaj valorigas vin. Se tio okazos, miaj aliaj celoj estus pli atingeblaj:
- igi Esperanto-Domon kaj niajn kunvenojn pli allogaj al homoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto
- diskonigi Esperanton en la publiko
- diskonigi la Federacion kaj Esperanto-Domon en Esperantujo

Se mi ne prezidantiĝos, mi feliĉos esti vic-prezidanto, aŭ ordinara estrarano. Ĉiuokaze, mi ankoraŭ planas mastrumadi la Federacian retejon www.EsperantoHouse.org.au.


TELOPEO
Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

Manlia Esperanta Klubo ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

EFNSW: Estraranoj: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato 11:00 ĝis 13:00
Por ĉiuj senpaga manĝeto, Esperanto Domo , Unua Dimanĉo de la monato 13:00 ĝis 16:00

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Paul Gorny (02) 9496 0395 Penny Vos (02) 6495 2922
Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Jaŭde 17:00 la Pancake Parlour, 122 Alinga St.,Civic.
Huigh 02 6288 4334 *huighm@gmail.com*

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo: Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 11:00 – 13:00 *(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*




| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Roger Springer |
| Kasisto: | Roger Springer |
| Sekretario: | Dmitry Lushnikov |
| Help-sekretario | Nicole Else |

Aliaj Estraranoj: Jonathan Cooper, Jano Wylles, John Casey